



Ĉarto de la Tutmondaj Verdaj Partioj

Canberra 2001, aktualigita en Dakar 2012

La Tutmondaj Verduloj estas la internacia retaĵo
de Verdaj partioj kaj politikaj movadoj.

Preamblo

Principoj

Ekologia Saĝeco
Sociala Justeco
Plurisma Demokratio / Demokratio de Partoprenantoj
Neperforto
Daŭripoveco
Respekto je Diverseco.

Politika Agado

1. Demokratio
2. Egaleco
3. Klimato-Ŝanĝiĝo kaj Energio
4. Biodiverseco
5. Regado de Ekonomia Tutmondiĝo pere de principoj de daŭripoveco
6. Homaj Rajtoj
7. Nutraĵo kaj Akvo
8. Daŭripova Planado
9. Paco kaj Sekureco
10. Agante Tutmonde

Glosaro

Esperanto-Versio tradukita de la Asocio de Verduloj Esperantistaj (AVE):
AVE, Kandelstr. 62, D-79194 Gundelfingen, ave@verduloj.org, www.verduloj.org

Preamblo

Ni, kiel civitanoj de la planedo Tero kaj membroj de la Tutmondaj Verduloj estas:

Unuiĝitaj en nia konscio, ke ni dependas de kaj estas mastrumantoj de la vitaleco, diverseco kaj beleco de la Tero kaj ke estas nia respondeco transdoni ĝin integra (nedifektita) al la sekva generacio;

Ekkonantaj ke la regantaj paradigmoj de la homa produktado kaj konsumado, bazitaj sur la dogmo de ekonomia kresko senrigarde la kostojn, ŝanĝas la klimaton, difektas la medion, forkonsumas la resursojn kaj kaŭzas amasan estingon de specioj;

Agnoskantaj ke maljusteco, malriĉeco, ignorado, korupcio, krimo kaj perforto, perarma solvo de konfliktoj, kaj la serĉo de maksimuma rapida profito kaŭzas ampleksan homan suferadon;

Akceptantaj ke la evoluintaj landoj pro ilia serĉado de ekonomiaj kaj politikaj celoj kontribuis al la senvalorigo de la medio kaj de la homa digneco;

Konprenantaj ke multaj el la popoloj kaj nacioj estis malriĝigitaj dum la longaj jarcentoj de koloniado kaj ekspluatado, kiu kreis ekologian ŝuldon flanke de la riĉaj nacioj rilate la malriĝigitajn;

Devigataj al la fermado de la breĉo inter riĉuloj kaj malriĉuloj kaj al la konstruado de nova civitaneco, bazita sur egalaj rajtoj por ĉiuj individuoj en ĉiuj sferoj de la socia, ekonomia kaj kultura vivoj;

Ekkonantaj ke sen egaleco inter viroj (viriĉoj*) kaj virinoj vera demokratio ne estas atingebla;

Koncernataj pri la digno de homeco kaj la valoro de kultura heredaĵo;

Ekkonantaj kaj la rajton de la indiĝenaj popoloj kaj ilian kontribuon al la komuna heredaĵo kaj la rajton de ĉiuj minoritatoj pri siaj kulturo, religio, ekonomia kaj kultura vivoj;

Konvinkataj ke prefere kunagado ol konkurado (rivaleco) estas bezonata por sekurigi homajn rajtojn kiel valora nutraĵo, komforta loĝado, sano, edukado, laboro, pura aero, trinkebla akvo kaj sana medio;

Ekkonantaj ke le medio ignoras limojn inter landoj; kaj

Baziĝantaj sur la Deklaracio de la Tutmonda Kunveno de Verduloj 1992 en Rio

Emfazas la neceson de fundamentaj ŝanĝoj en niaj kondutoj, valoroj kaj vivmanieroj;

Deklaras, ke la nova jarmilo markas ekiran punkton por komenci tian transformadon;

Decidiĝas subteni etikon de dauripoveco, kiu

- ⌚ protektas kaj riparas la integron de la Teraj ekosistemoj, kun aparta konsidero pri biodiverseco kaj la naturaj procesoj kiuj subtenas la vivon
- ⌚ altestimas la interdependecon de ĉiuj ekologiaj socialaj kaj ekonomiaj procezoj
- ⌚ ekvilibrigas individuajn interesojn kun la ĝenerala bonfarto
- ⌚ harmonigas liberecon kaj respondecon
- ⌚ akceptas diversecon en unueco
- ⌚ akordigas mallongtempajn celojn kun longdaŭraj
- ⌚ certigas ke estontaj generacioj havas la saman rajton kiel la nuna rilate naturajn kaj kulturajn utilaĵojn

Konstatas nian respondecon unu kontraŭ la alia, al la pli ampleksa komunumo de la vivantaro kaj al estontaj generacioj;

Dediĉas nin kiel tutmondaj Verdaj Partioj kaj politikaj movadoj por envicigi tiujn interrilatajn principojn kaj por krei tutmondan partnerecon por akceli ties plenumadon.

Principoj

La politiko de la Tutmondaj Verduloj baziĝas sur la jenaj principoj:

Ekologia Saĝeco

Ni agnoskas ke homoj estas parto de la natura mondo kaj respektas la esencan valoron de ĉiuj formoj de la vivo, inkluzive de ne-homaj specioj.

Ni agnoskas la scion de indiĝenaj popoloj de la mondo, kiuj estas la gardantoj de la lando kaj ties resursoj.

Ni agnoskas ke la homa socio dependas de la ekologiaj resursoj de la planedo, kaj devas sekurigi la integron de ekosistemoj kaj konservi biodiversecon kaj elastecon de vivo-subtenaj sistemoj.

Tio postulas

- ⌚ ke ni lernu vivi ene de la ekologiaj kaj resursaj limoj de nia planedo
- ⌚ ke ni protektas animalan kaj plantan vivon, kaj la vivon mem kiu estas subtenata de la naturaj elementoj: grundo, akvo, aero kaj suno
- ⌚ ke, kie la scio estas limigita, ni agu atenteme, por sekurigi la daŭran abundecon de la resursoj de la planedo por la nunaj kaj estontaj generacioj.

Sociale Justeco

Ni asertas ke la ŝlosilo al sociale justeco estas ekvilibrita distribuo de socialaj kaj naturaj resursoj, surloke kaj tutmonde, por senkondiĉe kontentigi bazajn homajn bezonojn kaj por sekurigi ke ĉiuj civitanoj havas plenajn eblecojn por individua kaj sociale evoluo.

Ni deklaras ke ne eblas sociale justeco sen media justeco, kaj inverse.

Tio postulas

- ⌚ justan organizadon de la mondo kaj stabilan mondo-ekonomion, kiu fermos la plilarĝiĝantan breĉon inter riĉuloj kaj malriĉuloj, kaj ene de kaj inter la landoj; ekvilibrigas la fluon de resursoj el la Sudo al la Nordo; kaj reduktas la ŝuldo-ŝarĝon de malriĉaj landoj kiu malhelpas ilian evoluon.
- ⌚ la elradikigon de malriĉeco kiel etika, sociale, ekonomia kaj ekologia devo
- ⌚ la elradikigon de analfabetismo
- ⌚ novan vizon de civitaneco surbaze de egalaj rajtoj por ĉiuj individuoj sendepende de sekso, aĝo, raso, religio, sociale klaso, etna aŭ nacia origino, seksa orientiĝo, handikapteco, riĉeco aŭ sano.

Plurisma Demokratio / Demokratio de la Partoprenantoj

Ni strebas al demokratio, en kiu ĉiuj civitanoj havas la rajton esprimi siajn vidpunktojn kaj la eblecon, rekte partopreni en ekologiaj, ekonomiaj, sociaj kaj politikaj decidoj, tuŝantaj

siajn vivojn; por ke la potenco kaj respondeco estu koncentrataj en surlokaj komunumoj kaj transdonataj al pli altaj niveloj de regado nur kiam esence bezonata.

Ĉi-cele necesas

- ⌚ individua poviĝo per atingebleco al ĉiuj ĉi-koncernaj informoj necesaj por ajna decido, kaj atingebleco al edukado por ebligi partoprenon de ĉiuj
- ⌚ malkonstruado de malegalecoj ekonomia kaj politika, kiuj malebligas tiun partoprenon
- ⌚ konstruado de bazokomunaj institucioj, por ke decidoj estu farataj rekte je la ĝusta nivelo de la afliktitaj personoj, surbaze de sistemoj kiuj kuraĝigas civitan vivecon, libervolan agadon kaj socian respondecon
- ⌚ forta subteno por doni voĉon al la junularo pere de edukado, kuraĝigo kaj asistante envolviĝon de la junuloj en ĉiu aspekto de la politika vivo, inkluzive ilian partoprenon en ĉiuj decidaj korporacioj.
- ⌚ ke ĉiuj elektitaj reprezentantoj estu devigataj al la principoj de travideblo, plenvereco kaj respondeco pri la regado.
- ⌚ ke ĉiuj baloto-sistemoj estu travideblaj kaj demokrataj, kaj ke tio estu fortigita per la leĝo
- ⌚ ke en ĉiuj baloto-sistemoj ĉiu persono havu egalan voĉdonan valoron
- ⌚ ke ĉiuj baloto-sistemoj estu bazitaj sur proporcia reprezentado, kaj ĉiuj balotoj estu financataj publike, kun striktaj limoj kaj plena travidebleco pri firmaaj kaj privataj donacoj.
- ⌚ ke ĉiuj civitanoj havu la rajton esti membro de iu ajn politika partio preferata de ili ene de multi-partia sistemo

Neperforto

Ni deklaras nian memdevigon al neperforto kaj strebas al kulturo de paco kaj kunlaborado inter ŝtatoj, ene de socioj kaj inter individuoj, kiel la fundamento de tutmonda sekureco.

Ni kredas, ke sekureco de devus baziĝi sur milita forto, sed sur kunlaborado, bona ekonomia kaj sociala evoluado, ekologia sekureco kaj respekto de la homaj rajtoj.

Por tio necesas:

- ⌚ larĝampleksa koncepto de tutmonda sekureco, kiu donas prioritaton al sociala, ekonomia, ekologia, psikologia kaj kultura aspektoj de konfliktoj, anstataŭ de iu koncepto bazita sur milita ekvilibro de potenco
- ⌚ tutmonda sekureco-sistemo, kapabla preventi, administri kaj solvi konfliktojn
- ⌚ forigi kialojn de milito per komprenado kaj respekto de aliaj kulturoj, elradikigo de rasismo, promociado de libereco kaj demokratio kaj finado de tutmonda malriĉeco
- ⌚ celi ĝeneralan kaj plenan senarmiladon, inkluzive de internaciaj konsentoj por garantii plenan kaj finfinan malpermeson al atomaj, biologiaj kaj kemiaj armiloj kaj kontraŭhomaj minoj kaj armiloj kun malriĉigita uranio
- ⌚ subteni UN-on kiel la tutmondan organizaĵon de konflikt-administrado kaj pac-gardado
- ⌚ celi rigoran konduto-regularon pri eksporto de armiloj al landoj kie la homaj rajtoj estas malobeitaj.

Daŭripoveco

Ni agnoskas la limigitecon de la materia ekspansio de la homa socio ene de la biosfero, kaj la neceson konservi biodiversecon pere de daŭripova uzo de renoveblaj resursoj kaj respondecan uzon de ne-renoveblaj resursoj.

Ni kredas, ke por atingi daŭripovecon kaj por provizi la bezonojn de nunaj kaj estontaj generacioj ene le limigitaj resursoj de la tero, kontinua kresko de tutmondaj konsumo, loĝantaro kaj materia malegaleco devos esti haltigata kaj renversita.

Ni agnoskas ke daurigebleco ne eblas dum ekzistas malriĉeco.

Por tio necesas

- ⌚ ke riĉuloj limigu sian konsumon - por juste dividi kun la malriĉuloj la resursojn de la Tero.
- ⌚ redifini la koncepton de bonfarto, cele fokusiĝon sur la kvalito de vivo anstataŭ sur la kapablo de superkonsumado
- ⌚ krei tutmondan ekonomikon, kiu celas kontentigi bezonojn de ĉiuj, ne avidon de kelkaj, kaj ebligas al la nunaj vivantoj kontentigi siajn bezonojn ne endanĝerigante la eblecojn ĉi-koncernajn de la estontaj generacioj
- ⌚ elimini la kaŭzojn de la kresko de la mondloĝantaro, certigante ekonomian sekurecon, provizante aliron al baza edukado kaj sanservo por ĉiuj; donante kaj viroj kaj virinoj pli grandan kontrolon pri sia fekundeco
- ⌚ redifini la rolojn kaj respondecojn de trans-naciaj entreprenoj por subteni la principojn de daŭrigebla evoluo
- ⌚ efektiviĝi meĥanismojn por kolekti impostojn kaj reguligi spekulajn financajn movojn
- ⌚ certigi ke merkataj prezoj de varoj kaj servoj plene enhavas la mediajn kostojn rilate la produktadon kaj konsumadon
- ⌚ atingi pli efikan eluzon de naturrimedoj kaj energio kaj utiligi ekologie daŭripovajn teknologiojn
- ⌚ subteni surlokan memfidon ĝis plej granda praktika grado, por krei reale indajn komunumojn
- ⌚ ekkoni la pivotan rolon de junula kulturo kaj kuraĝigi etikon de dauripoveco ene de tiu kulturo.

Respekto je Diverseco

Ni altestimas kulturan, gentan, rasan, seksan, religian kaj spiritan diversecon en kunteksto de individua respondeco antaŭ ĉiuj estaĵoj.

Ni defendas la rajton de ĉiuj homoj, sendiskriminacie havi ĉirkaŭejon koncernan por iliaj digno, korpa sano kaj spirita bonfarto.

Ni promocias la konstruadon de respektoplenaj, pozitivaj kaj respondecaj rilatoj trans apartigolinioj en la spirito de mult-kultura socio.

Por tio necesas

- ⌚ agnosko de la rajtoj de aŭtoĥtonaj homoj havi bazajn rimedojn por la transvivado, ekonomiajn kaj kulturajn, inkluzive teritoriajn rajtojn kaj mem-determinon; kaj agnosko de ilia kontribuo al la komuna heredaĵo de nacia kaj tutmonda kulturo

- Ⓟ rekono de la rajtoj de etnaj minoritatoj disvolvi siajn kulturon, religion kaj lingvon sen diskriminacio, kaj partopreni plene laŭleĝe, socie kaj kulture en la demokratia procezo
- Ⓟ rekono de kaj respekto al seksaj minoritatoj
- Ⓟ egaleco inter virinoj kaj viroj en ĉiuj sferoj de socia, ekonomia, politika kaj kultura vivo.
- Ⓟ signifa inkluzivado de junula kulturo kiel valora kontribuo al nia Verda vizio, kaj rekono ke junuloj havas apartajn bezonojn kaj manierojn sin esprimi.

Politika Agado

1. Demokratio

1.0 La plimulto de la homaro vivas en landoj regataj de kontraŭ-demokratiaj reĝimoj, kie korupto superas kaj kie misuzo de homaj rajtoj kaj cenzurado de publikaĵoj estas ĉiutaga. Evoluigintaj demokratioj suferas je malpli evidentaj formoj de korupto pere de amasmedia koncentriĝo, kompania financado de politiko, sistema ekskludo de rasaj, etnaj, naciaj kaj religiaj komunumoj, kaj pere de balotosistemoj kiuj diskriminacias alternativajn ideojn, kaj novajn kaj malgrandajn partiojn.

La Verduloj -

- 1.1 Prioritate kuraĝigas kaj subtenas t.n. herbo-radikajn movadojn kaj aliajn organizaĵojn de civila socio kiuj laboras por demokratia, travidebla kaj prikalkulebla registaro je ĉiuj niveloj.
- 1.2 Forte subtenas havigon de voĉo al junuloj pere de edukado, kuraĝigo kaj subtenado junulan partoprenon en ĉiu aspekto de politika agado.
- 1.3 Penos por la demokratiigo de ĝendraj rilatoj antaŭenigante konvenajn mediaciojn ebligi, ke virinoj kaj viroj egale partoprenas en la ekonomia, politika kaj socia sfero.
- 1.4 subteni la OEKE-traktaton (Organizo por Ekonomia Kooperado kaj Evoluo) por Kontraŭi Kaŝpagon de Fremdaj Publikaj Oficistoj en Internacia Negociado kaj instigi ne-partiojn* subskribi kaj ratifi ĝin sen plia prokrasto.
- 1.5 Defendas la rajton de civitanoj havi aliron al oficialaj informfontoj kaj al liberaj kaj sendependaj publikaĵoj.
- 1.6 Laboros por universala aliro al elektronika komunikado kaj informatiko, komencante je bazaj formoj kiel radioelsendoj kaj baz-grupaj interreto kaj retpoŝto. Ni ankaŭ laboros por ke aliro al tiuj teknologioj estu plejeble malkara.
- 1.7 Konfirmas justan sekularan justico-sistemon, kiu certigas la rajton je defendo kaj praktikas adekvatecon inter krimo kaj puno.
- 1.8 Subtenas la publikan financadon de balotoj, kaj aranĝas certigi, ke ĉiuj donacoj estu plene travideblaj kaj respondigeblaj kaj estas sen troa influo, ĉu perceptite aŭ alie.
- 1.9 Denuncas korporacian superregadon super la registaro, speciale kiam civitanoj estas prirabitaj de ilia rajto je politika partopreno.
- 1.10 Subteni la dividon de la fortoj inter la ekzekutivo, leĝodonado kaj jurisdikcio; kaj la dividon inter ŝtato kaj religio.
- 1.11 Subtenas la evoluon kaj fortigon de loka regado.
- 1.12 Subtenas la restrukturadon de ŝtataj institucioj por fari ilin demokrataj kaj pli

travideblaj kaj efikaj por servi direkte al la civitana povo kaj al daŭripova disvolvo.

- 1.13 Subtenas tutmondan direktadon surbaze de la demokrata principo de unu persono – unu voĉdono - unu valoro, prefere ol pere de neelektitaj kompaniaj interesoj.

2. Egaleco

- 2.0 La diferencoj inter la vivniveloj kaj -eblecoj en la hodiaŭa mondo estas netolereblaj. La ŝuldoj de la t.n. tria mondo troviĝas je la plej alta nombro de 3,7 bilionoj* USD kaj samtempe OEKE (en: OECD, Organization for Economic and Developmental Cooperation) helpas pere de 0,31% de la MNP (Malneta Nacia Produkto, angle BNP). La plej riĉaj 20% de la homaro havas enspezon de pli ol 83% de la tutmonda enspezo, dum la plej malriĉaj 20%, inter ili preskaŭ 50% de la monda junularo, havas apenaŭ 1% de la enspezo kaj 2,6 miliardoj homoj vivtenas sin per malpli ol 2 USD tage. 60% de la mondaj malriĉuloj estas virinoj. 130 milionoj infanoj neniam vizitas lernejon dum 800 milionoj plenkreskuloj povas nek legi nek skribi; 2/3 el ili estas virinoj. La populacia kresko malrapidiĝis, sed oni prognozas ke ĝi kreskos de 6,1 miliardoj homoj en la jaro 2000 ĝis 8,9 en la jaro 2050, altiĝo de 47%.. Aidoso (HIV) kaj tuberkulozo (TB) restos severaj problemoj.

La Verduloj -

- 2.1 Laboros por altigi la registaran subtenon al evoluantaj landoj kaj subtenas la direktadon de la financa helpo al la plej malriĉaj, kun prioritatoj determinite al kunlaboro kun lokaj komunumoj.
- 2.2 Laboros por plibonigi la rajtojn, statuson, edukadon kaj politikan partoprenon de virinoj.
- 2.3 Sindevigas al la celo, ke altkvalita primara edukado estu ĝenerale ĝis 2015, financata pere de altigita helpo kaj redukto de ŝuldoj.
- 2.4 Laboros por la abolicio de la ŝuldoj de evoluantaj landoj, speciale de la plej malriĉaj, kaj subtenos la uzadon de stimuloj por certigi, ke la ŝparita mono el la ŝuldo-reduktado estu kanaligata en la reduktadon de la malriĉeco kaj media konservado, kaj ke tio okazas laŭ travideblaj kaj justaj-honestaj proceduroj pere de partopreno de afliktitaj komunumoj.
- 2.5 Vidas kunligitan agadon por kontraŭstari la grandajn tutmondajn epidemiojn, inkluzive prioritato al aidoso (HIV), tuberkulozo (TB) kaj malario, speciale en Afriko, kie duflanka klopodo necesas: havigi ĝeneralan aliron al malaltkostaj kaj efikaj terapioj, kaj restarigi la ekonomian progreson, speciale pere de edukado.
- 2.6 Agnoskas la rajton al kompensado por tiuj homoj kiuj perdas la alireblecon al siaj naturaj resursoj kaŭze de dislokigo pro medio-detruo aŭ homa interveno kiel kolonizado kaj migrado.
- 2.7 Pripensas la rilaton inter ekskluda propreco de propraĵo kaj ekskluda uzado de ĝiaj resursoj, antaŭvidanta la reduktadon de medio-misuzo kaj pli-ampleksan aliron al bazaj vivbezonaĵoj por ĉiuj, speciale al indiĝenaj komunumoj.
- 2.8 Laboros por certigi ke ĉiuj viroj, virinoj kaj infanoj povas atingi ekonomian sekurecon, sen bezono al damaĝantaj aktivecoj kiel pornografio, prostituado aŭ la vendon de organoj.
- 2.9 Devligas sin labori por pli egalan distribuon de bonstato kaj por la kreado de egalaj eblecoj ene de ĉiuj niaj socioj, agnoskante ke ekzistas kreskanta nombro da malriĉuloj kaj ankaŭ marĝenigitaj homoj en evoluitaj landoj.

- 2.10 Komprenas ke la aktuala formo de financumita novliberala kapitalismo subtenadas la riĉulojn kaj inkliniĝas al krizoj. Ĝi kontribuas al kreskanta malegaleco kaj senposedigo de malriĉuloj.
- 2.11 Ni defendos kaj antaŭenigos la homajn, socialajn kaj natur-mediajn rajtojn de indiĝenaj popoloj.

3. Klimato-Ŝanĝiĝo kaj Energio

- 3.0 La klimato krizo estas kaj plej granda defio frontanta kontraŭ la tutmonda komunumo kaj la plej granda okazo de homaro rekonsideri kiel ni vivus, laŭ maniero kiu estas sociale justa kaj ene de la ekologiaj limoj de la Tero. La Verduloj sin devontigas al limigo de la tutmonda temperaturo-altiĝo al ne pli ol 1.5 gradoj super la antaŭindustriaj niveloj. Tutmondaj eligaĵoj devos atingi la pinton longe antaŭ 2020 por havi ŝancon resti ene de ĉi tiu temperaturo limo.

La Verduloj -

- 3.1 Adoptas la celon limigi la CO2 nivelojn en la atmosfero al 450 ppm en la plejble mallonga periodo.
- 3.2 Laboros subteni rapidan transiron al nul-karbonaj ekonomioj tutmonde.
- 3.3 Laboros establi internacian raportantan agokadron pri eligaĵoj de trans-naciaj kompanioj, ligita al tutmondaj karbon-impostoj kaj tutmondaj ekologiaj ŝarĝoj.
- 3.4 Laboros forte por certigi, ke evoluantaj landoj havos aliron al la plej efika, daŭrigebla kaj adaptitaj teknologioj, fokusante al renovigeblaj energioj, kaj ke ili konsentas kun la Klimato-Ŝanĝiĝaj Konvencioj por certigi, ke agoj estas adekvataj kaj tutmondaj. La egaleco-principo devas esti en la kerno de klimato-ŝanĝiĝaj intertraktadoj kaj rimedoj.
- 3.5 Oponas ĉian etendiĝon de nuklea energio kaj laboros por ĝia rapida finigado.
- 3.6 Subtenos alvoki moratorion pri esplorado kaj disvolvo de novaj fosiliaj fueloj.
- 3.7 Laboros por halti senarbarigon kaj degeneron de naturaj arbaroj ĝis 2020, rimarkante ke ili estas la pleje karbon-enhavaj ekosistemoj de la planedo, estas vivnecesaj por indiĝenaj popoloj, riĉaj je plantoj kaj bestoj, kaj ne regajneblaj dum homa temposkalo.
- 3.8 Antaŭenigas arbo-plantadon de diversaj specioj, sed ne de monokulturoj, kiel rapide atingeblan rimedon por karbono-enfermo, kun kromaj avantaĝoj por la medio.
- 3.9 Antaŭenigas la pagigon de impostoj sur ne-renovigeblaj energioj kaj subtenas la uzon de fondusoj cele antaŭenigo de energio-efikeco kaj renovigebla energio.
- 3.10 Subtenas esploron pri la uzo de daŭrigeblaj fontoj de energio kaj pri la teknika disvolvo de ekologia energio-produktado.
- 3.11 Antaŭenigas transdonon de energio-efikaj teknologioj kaj verda-energio infrastrukturo inter kaj ene de landoj kaj ekonomioj senkoste aŭ je minimumaj kostoj. Ĉi tiu estas unu el la ekonomiaj kostoj de la nunaj eligaĵoj flanke de okcidentaj landoj.

4. Biodiverseco

- 4.0 Kvankam sanaj ekosistemoj estas esencaj por la homa vivo, ŝajne ni forĝesis la rilaton inter naturo kaj socio. Estingiĝo-nombroj estas ekde 100- ĝis 1000-oble pli grandaj ol en la antaŭhoma epoko. Nur 20% da originalaj arbaroj sur la Tero restis

relative netuŝite; 80% da fiŝo-populacioj estas jam reduktitaj aŭ endanĝerigitaj de troa fiŝkaptado. Invadoj de ekster-regione devenaj herboj, bestoj kaj malsanoj multiĝas rapide. Detruado de vivlokoj kaj estingado de specioj estas kaŭzataj de industria kaj terkulturista evoluo, kiu ankaŭ rezultigas ŝanĝojn de la klimato, tutmondan malegalecon kaj detruadon de indiĝenaj kulturoj kaj vivmanieroj. Agrikultura monokulturo, antaŭenigata de la agro-industrio kaj akcelita de genetika modifado kaj patentigo de naturo, minacas la diversecon de kultivitaj plantoj kaj bruto-specioj, radikale pliigante vundeblecon pro malsano.

La Verduloj -

- 4.1 Entuziasme kontraŭas terkulturistan kaj industrian evoluojn detruemajn al la vivmedio, kaj unuavice klopodas protekti originajn plantojn kaj bestojn en iliaj regionoj (latine: in situ) kaj laŭeble ĉiam en vastaj areoj.
- 4.2 Klopodos abolicii monsubtenojn por agadoj vivmedie detruemaj, inkluzive de arbarforhakado, ekspluatado da fosiliaj fueloj, bar-digoj, minado, genetika inĝenierado kaj agrikultura monokulturo..
- 4.3 Stimulos ekologian aĉeto-politikojn por produktoj kiel ligno, kiu baziĝu nur sur plej strikta difino de daŭripovo, subtenata de kredinda etikedado.
- 4.4 Subtenas la koncepton "interŝanĝo de ŝuldoj favore al la naturo", laŭ interkonsento de la koncernaj indiĝenaj kaj surlokaj komunumoj.
- 4.5 Antaŭenigos la riparadon de degeneritaj ekologioj, kaj la postpurigon de toksigitaj ejoj de iamaj kaj nunaj militistaj kaj industriaj zonoj tutmonde.
- 4.6 Notas, ke redukti la transporton de varoj tra la mondo, kunordigite kun preferemo de lokaj produktoj ĉie kie eblas, plie bonos per reduktado je bioinvadoj, je konsumo de fosiliaj bruligaĵoj kaj je eligo de forcejaj gasoj.
- 4.7 Devontigas sin antaŭenigi tutmondan ekologian instruplanon por ĉiuj niveloj de edukado.
- 4.8 Laboros cele al establado de internacia justico-tribunalo specife rilate ekologian detruon kaj perdon de biologia diverseco, kie kazoj povas esti traktataj kontraŭ kompanioj, ŝtatoj, landoj kaj individuoj.
- 4.9 Rifuzos akcepti la patentigon kaj surmerkatingon de vivaĵo.

5. Regi ekonomian tutmondiĝon per daŭripovaj principoj

- 5.0 Kvindek tri el la 100 plej grandaj ekonomiaj sistemoj de la mondo hodiaŭ estas korporacioj. Kune kun kunludantaj registaroj ili kreis leĝosistemon, kiu starigas nebremsitan ekonomian aktivecon super la publika bonfarto, protektas bonfarton de korporacioj sed atakas socian bonfarton, obeigas naciajn ekonomiojn al ampleksa financa fi-kazino kiu enmetas ĉiutage 3 bilionojn (10^{12}) da USD en spekulaciaj transakcioj. La Tutmonda Financa Krizo plialtigis la variemon kaj malcertecon en ĉiuj ekonomioj, kun la plej grava efiko sur malpli riĉaj individuoj, grupoj kaj landoj. IMF (Internacia Mona Fonduso) kaj Monda Banko plie kontribuis al tiu krizo, ol esti parto de la solvo; la antaŭkondiĉoj, sur kiuj ili baziĝas ne taŭgas por krei tutmondan, daŭrigeblan kaj justan ekonomian sistemon.

La Verduloj -

- 5.1 Asertas, ke esencaĵoj por la vivo, kiel akvo, devas resti posedataj kaj kontrolataj de la

publiko; kaj ke kulturo, baza aliro al manĝaĵo, sociala kaj publika sano, klerigo kaj liberaj publikaĵoj ne estas komercaĵoj, dependantaj al internaciaj merkataj interkonsentoj.

- 5.2 Subtenas kreadon de Tutmonda Medio-Organizaĵo, kombinante UNMP (en: UNEP), UNDP (en: UNDP) kaj Tutmondan Medio-Oficejon (en: GEF) en unusolan institucion, financitan kaj ekipitan per sankci-povo, por stimuli la tutmondan daŭripovan disvolvon. Decidoj de tiu ĉi institucio superu tiujn de MKO (en: WTO).
- 5.3 Subtenas seriozan reformon de Monda Banko kaj IMF tiel, ke ilia membreco- kaj decido-principoj estas demokratiaj kaj iliaj agoj obeemaj al daŭripovaj principoj, al ĉiuj internaciaj traktatoj pri homaj kaj laboristaj rajtoj, kaj al medio-protektado.
- 5.4 Subtenas seriozan reformon de MKO por igi daŭripovon ĝia centra celo, helpe de travidebla kaj demokratia proceduroj kaj de partopreno de reprezentantoj de la koncernaj komunumoj. Adicie devas ekzisti la disigo de la povoj por depreni la iniciaton pri disputoj de la ekskluda kompetenco de la MKO. Ni postulas taksu la antaŭajn negoco-rondojn pri iliaj efikoj koncerne daŭripovo antaŭ ol iuj novaj paŝoj estos farataj.
- 5.5 Laboros preventi la enkondukon de novaj akordoj pri regionaj aŭ hemisfera komerco kaj investado sub la reguloj de TKO - ekzemple la proponitan Liber-Komerca Akordo de la Amerikoj - sed subtenos la integriĝo-procezojn kiuj sekurigas la bonfarton de la popolo kaj la daŭripovon de la medio.
- 5.6 Kreos tutmondan regulo-medion, kie financaj kaj ekonomiaj institucioj nutras kaj protektas vivomedie daŭripovajn projektojn, kiuj daŭre subtenos komunumojn je ĉiuj niveloj (loka, regiona, nacia kaj internacia).
- 5.7 Postulas ke internaciaj akordoj pri la medio, labor- kondiĉoj kaj sano devus superi iujn internaciajn komercajn regulojn.
- 5.8 Klopodos efektiviĝi Tobin-Henderson-an aŭ Financ-Transakcian Imposton kaj aliajn rimedojn por redukti spekulaciajn devizo-transakciojn, por kuraĝigi investadon en la realan ekonomion, kaj por krei fonduson kiu favoras egalecon en la tutmonda evoluo.
- 5.9 Klopodos, ke estu postulata, ke korporacioj respektadu viv-mediajn, laboristajn kaj socialajn leĝojn de sia propra lando kaj de landoj kie ili agas, laŭ tiu nivelo kiu estas la pli severa.
- 5.10 Klopodos sekurigi ke ĉiuj tutmondaj organizaĵoj, speciale la tiom fortaj kiuj decidas la regulojn de internacia komerco, devligas sin al principoj de daŭripova disvolvo kaj sekvas trejniĝo-programon cele al ŝanĝo de sia kulturo por plene realigi tiun celon.
- 5.11 Volas, ke korporacia situacio fariĝu travidebla kaj respondeca je la sama nivelo kiel sociala bonfarto, kaj ke monsubtenoj al agadoj detruantaj al la vivmedio kaj la socio entute finiĝu laŭplane.
- 5.12 Promulgas disvolvi civilan entreprenistan sintenon promocii komuneco-bazitan ekonomion kiel rimedon kontraŭstari socian ekskludon, kaŭzita de ekonomia tutmondiĝo.

6. Homaj Rajtoj

- 6.0 Malobservado de Homaj Rajtoj kaj liberecoj rekte rilatas al malriĉeco kaj politika senpotenco. Milionoj suferas pro diskriminacio, timigado, arbitra malliberigo, perforto kaj mortigo. Tri kvaronoj de la registaroj en la mondo utiligis torturon dum la lastaj tri jaroj.

La Verduloj -

- 6.1 Promulgas (subtenas) la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj, la Internaciajn Interkonsentojn pri Ekonomiaj, Socialaj kaj Kulturaj Rajtoj, pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj, pri Laboristaj Rajtoj kaj aliajn internaciajn rimedojn pri la protektado de rajtoj kaj liberecoj. Ni kredas ke tiuj rajtoj estas universalaj kaj nedivideblaj kaj ke naciaj registaroj respondecas pri ties observado.
- 6.2 Kondamnas ĉian diktatorecon kaj reĝimojn kiuj neas homajn rajtojn, sendepende de iliaj politikaj pretendoj.
- 6.3 Kunlaboros kun lokaj komunumoj por varbi pri konscio de homaj rajtoj kaj certigi ke la UN Komisiono pri Homaj Rajtoj kaj aliaj traktato-instancoj havu adekvatajn rimedojn.
- 6.4 Alvokas por ke la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj estu amenditaj pere de enkonduko de la rajtoj al saniga natura medio kaj intergeneraciaj rajtoj al naturaj kaj kulturaj resursoj.
- 6.5 Subtenas la rajton de virinoj fari siajn proprajn decidojn, inkluzivante la kontrolon de sia fertileco per rimedoj kiujn ili opinias taŭgaj, sen diskriminacio aŭ devigoj; subtenas la Konvencion pri la Elimino de Diskriminacio Kontraŭ Virinoj (KEDKV), instigas ne-subskribintojn subskribi kaj ratifi sen plua prokrasto kaj instigas ekzistantajn subskribintojn forigi ĉiujn rezervojn.
- 6.6 Subtenas la rajton de indiĝenaj popoloj je memdeterminado, teritoriaj rajtoj, kaj la alirebleco al tradiciaj ĉasad- kaj fiŝkaptado-rajtoj por sia propra vivtenado, uzante humanaj kaj viv-medie daŭripovaj teknikoj; kaj subtenas la strebojn, por ke indiĝenaj popoloj establu siajn proprajn internaciajn instancojn kaj laboru per tiuj.
- 6.7 Subtenas la UN-an Deklaracion pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj kiel minimuman normon de protektado, kiu estis akceptita de indiĝenaj popoloj; kaj subtenas mociojn, ke indiĝenaj popoloj establu siajn proprajn internaciajn instancojn kaj laboru per tiuj.
- 6.8 Postulas, ke torturistoj estu respondecaj, kaj kampanjas, por ke oni metu ilin al la justeco, aŭ en siaj propraj landoj aŭ aliloke, antaŭ internacian kortumon de juĝistoj sub la reguloj de la Internacia Krime-Kortumo.
- 6.9 Kontraŭstaras ĉian vundigon de fiza integro de individuo pere de torturo, puno aŭ iu ajn alia praktikadoj inkluzive de tradicia aŭ religia mutilacio.
- 6.10 Postulas tutmondan abolicion de la morto-puno.
- 6.11 Alvokas registarojn certigi, ke azilopetantoj, ĉu ili estas viktimoj de ŝtata perforto ĉu de sendependaj armitaj grupoj, estu traktataj korekte laŭ la Ĝeneva Konvencio pri la Rajto al Azilo de 1951; rajtas havi aliron al justaj procezoj; ne estu arbitre malliberigataj, kaj ne estu reirigataj al lando kie ili eble suferus rompojn de siaj fundamentaj homaj rajtoj., aŭ riskus morton, torturon aŭ alian ne-humanan traktadon.
- 6.12 Alvokas por la malpermeso de kolektiva forpelado.
- 6.13 Subtenas la rajton de laboristoj al nedanĝera, favore kompensata laboro, kun la libereco membriĝi en sindikatoj.
- 6.14 Subtenas la rajton de infanoj kreski liberigita je la devo labori, kaj establi reduktitan aĝo-limon por laborantaj infanoj/adoleskuloj.
- 6.15 Postulas ke homoseksismo ne plu estas krimo, kaj subtenas la rajton de gejaj kaj lesbaj homoj al ilia vivstilo, kaj la egalajn rajtojn por homoseksaj rilatoj.
- 6.16 Laboros por plibonigi la eblecojn de handikapitaj homoj vivi kaj labori egale en la

socio, inkluzive de vera politika partopreno.

6.17 Subtenas la rajton de lingvaj minoritatoj uzi siajn proprajn lingvojn.

7. Nutraĵo kaj akvo

7.0 Centmilionoj da homoj restas subnutrataj, ne pro nesufiĉo da manĝaĵo, sed pro neegala alirebleco al grundo, akvo, kredito kaj merkatoj. Genetike modifitaj organismoj (GMO) ne estas la solvo, ĉar la akuta problemo ne estas la produktado sed la distribuo. Tute kontraŭe, GMO alportas neakcepteblan riskon por la medio, sendependaj malgrandaj farmistoj kaj konsumantoj; kaj same al la biodiverseco kiu estas nia plej taŭga asekuro kontraŭ agrikulturaj katastrofoj. Malabundo da akvo minacas kaj en surteraj sistemoj kaj en grundakvaj. Senarbarigado de akvokolektaj terenoj (akvokaptejoj) havas la katastrofajn sekvojn de ter-lavangoj kaj inundoj, dum dezertiĝado kaj malpliboniĝado rapide ampleksiĝas. Hela lumopunkto estas la rapida kresko de organika agrikulturo.

La Verduloj -

- 7.1 Opinions, ke alirebleco al pura akvo pro bazaj bezonoj estas fundamenta rajto, kaj oponas la privatigadon je akvaj resursoj kaj infrastrukturoj.
- 7.2 Laboros por forigi subvenciojn por akvouzado sed ne por socialaj subvencioj, kaj subtenos pli efikan uzadon de akvo.
- 7.3 Laboros por certigi ke freŝa akvo kaj subgrundaj akvo-resursoj estu konservataj laŭ kvalito kaj kvanto, kaj ke taŭgaj prezoj certigu ke tiaj resursoj estu protektataj adekvate kontraŭ forkonsumo.
- 7.4 Opinions, ke la stabileco de akvokaptejoj kaj la sano de riversistemoj estas ĉefaj punktoj, kaj laboras kun la homoj rekte afliktitaj por haltigi malplibonigadon de riveroj, inkluzive de novaj val-baraĵoj kaj irigaciaj projektoj kaj senarbarigo de akvokaptejoj.
- 7.5 Laboros kun lokaj komunumoj en aridaj kaj duonaridaj regionoj, kie dominas klimata necerteco, por redukti la degradigon de la grundo.
- 7.6 Esprimas sian afliktecon por landoj kiuj forte estis batitaj pro dezertiĝo kaj senarbarigo, kaj petas tiujn landojn, kiuj ankoraŭ ne ratifis la UN-Konvencion pri Dezertiĝo, ke ili ratifu ĝin; kaj por provizi la necesajn resursojn por aktivigi ĉi-tiun konvencion.
- 7.7 Subtenos kaj reklamas organikan agrikulturon.
- 7.8 Alvokas pri tutmonda malpermeso de komerca kultivado de genetike modifitaj plantoj.
- 7.9 Laboros por certigi ke nutraĵo estas sekura, kun striktaj reguloj pri produktado, stokado kaj vendado.
- 7.10 Laboros por certigi, ke scienca esplorado progresos etike kaj estos aplikata laŭ la principo de singardemo.
- 7.11 Alvokas por finiĝi la uzadon de ĉiuj persistaj kaj bio-akumuliĝantaj hom-faritaj kemiaĵoj kaj por labori je la eliminado de ĉiuj ellasaĵoj da danĝeraj kemiaĵoj en la medion.
- 7.12 Laboros por certigi ke por-brutaj kresko-hormonoj estu malpermesataj, kaj por fortigi striktajn regulojn al la uzo- reguloj pri por-brutaj antibiotikaĵoj.

- 7.13 Laboros por certigi humanan traktadon de ĉiuj bestoj dum bredado, transportado kaj buĉado, kaj certigos la bonfarcon de bestoj.
- 7.14 Laboros al certigo, ke la efiko de erozio, inundoj kaj aliaj mediaj riskoj estu korektata kaj ke taŭgaj adaptaj aranĝoj estos efektividataj.

8. Planado de la Daŭripoveco

- 8.0 Konsumado en industraj landoj estas ekscesa, transe de iu ajn mezuro, kaj plejparte respondecas pri la naturmedia malboniĝo. Nove industriiĝantaj landoj ankaŭ kreskigas sian konsumon, kio ankoraŭ signife plialtigas la ekologian premon. La ŝanĝiĝo al verda ekonomio, kiu imitas ekologiajn procezojn, evitas rubon per reuzado kaj reciklado de materialoj, kaj emfazas aktivecojn kiuj plialtiĝas la vivo-kvaliton kaj interrilatojn, kontraŭe al la foruzado de varoj - promesas novajn okupojn, industriojn kun malpli da poluado, pli bonajn laboretosojn kaj altigitan viv-kvaliton.

La Verduloj -

- 8.1 Preferas alian mezuradon de bonfarto ol Brutta Nacia Produkto (BNP), por mezuri progreson kaj agnoskas la ekologiajn limojn al materia kresko kaj konsumado.
- 8.2 Konsideras, ke la civitanoj en landoj afliktitaj de iu ajn projekto rajtas partopreni decidojn pri ĉi tiu, senkonsidere al naciaj limoj.
- 8.3 Laboros por certigi ke tiuj kiuj profitas de la ekspluatado de iuj komunaj aŭ naturaj resursoj devus pagi la plenan merkatan renton por la uzado de tiuj resursoj, krome por ĉiu ajn damaĝo al aliaj komunaj resursoj.
- 8.4 Agnoskas, ke la ĝena influo de la urbo-ampleksiĝado al la kamparo kaj natura medio devas esti limigata kaj finfine haltigata.
- 8.5 Agnoskas, ke la procezo de la urbanizado pro la kampara malriĉeco devas esti bremsata kaj renversata pere de taŭgaj disvolvo-programoj por la kamparaj regionoj, kiuj protektas la karakteron kaj ekologion de kampara pejzaĝo.
- 8.6 Kuraĝigas urboplanadon por ekologie daŭripova komerco, loĝigo, transportado, rubotraktado, parkoj, urbaj arbaroj, komunaj spacoj; kaj faros ligojn inter Verduloj ĉe loka kaj regiona nivelo ĉirkaŭ la mondo por interŝanĝi informon kaj subtenon.
- 8.7 Klopodos redukti la urban poluadon kaŭze de veturiloj, kontraŭante la kontinuan plivastigon de aŭtoŝoseoj; kuraĝigante la uzadon de energio-efikaj veturiloj; integriĝante en la planadon de landuzo la publikan transportadon, bicikladon kaj piediradon; favorante la planadon kaj financan subtenon de publikaj amaso-transportiloj super privata aŭto- infrastrukturo; kaj eliminante imposto-politikon kiu favoras aŭto-centritan disvolvon.
- 8.8 Klopodos krei sociale respondecajn ekonomiajn strategiojn, uzante impostojn kaj publikajn financojn kiuj maksimumigas la stimulojn por justa distribuo de riĉeco, kaj eko-impostojn, kiuj provizas stimulojn por eviti rubon kaj poluadon.
- 8.9 Postulas, ke korporacioj kaj komunumoj reduktas, reuzas kaj reciklas rubaĵon, celante al senruba ekonomio, simile al natura ekosistemo.
- 8.10 Subtenos ĉiajn politikojn kiuj ebligas al landoj altigi la kreadon de laborpostenoj pere de ekonomiaj aktivecoj kiuj adicias valoron aŭ pere de reciklado de resursoj, produktado de daŭraj varoj, organika agrikulturo, renovigebla energio kaj naturmedia protektado.
- 8.11 Promocias socie respondecan investadon kaj ekologian merkaton tiel, ke

konsumantoj povas fari pozitivajn elektojn, bazitaj sur fidindaj informoj.

- 8.12 Agnoskas la valoron de tradicia kaj surloka scio kaj kredo, kaj subtenas ĝian enkorpon en la planadon kaj en projektojn.

9. Paco kaj sekureco

- 9.0 Ni komprenas pacon kiel ion pli ol nur manko de milito. Strebi al paco ĉiam estis en la kerno de la Verda agendo. La kaŭzoj de konfliktoj ŝanĝiĝas. La efikoj de klimatoŝanĝiĝo, konkurado por akvo, nutraĵo kaj rimedoj baldaŭ iĝos signifaj. La diferencoj inter milito, organizata krimo kaj intenca rompado de homaj rajtoj malkonturiĝadas. Ekde 2001 la "milito kontraŭ teroro" samtempe kondukis al erozio de la homaj rajtoj nome de sekureco. La armila komerco kreskas kaj tutmondiĝas nutrata per escepto el la MKO-reguloj (en: WTO) kontraŭ subvencioj. Kiel tutmonda reto ni havas vitalan rolon en la fortigado de ligoj inter komunitaj organizaĵoj, kiuj laboras por homaj rajtoj kaj paco, kaj en la subtenado kaj formado de ekestiĝantaj konceptoj kaj institucioj de tutmonda regado.

La Verduloj -

- 9.1 Subtenas la fortigon de la rolo, kiun ludas la Unuiĝintaj Nacioj (UN) kiel tutmonda organizaĵo por la konflikto-traktado kaj la paco-konservado. Samtempe la Verduloj agnoskas, ke en kazoj de malsukcesa prevento kaj en situacioj de strukture kaj akre rompataj homaj rajtoj kaj/aŭ genocido, la uzado de perforto povas esti justigita se ĝi estas la sola rimedo preventi pliajn rompojn de la homaj rajtoj kaj suferadon, kondiĉe ke ĝi okazas sub mandato de la UN. Ĉiukaze, individuaj ŝtatoj havas la rajtojn ne subteni aŭ kunlabori je tiu-ĉi agado.
- 9.2 Varbos por pli granda influo por la landoj de la Sudo ene de la UN, laborante por abolicii al vetoo-forton en la Secureco- Konsilio, abolicii la kategorion de daŭra membreco en ĝi, kaj por pligrandigi la nombron da membroŝtatoj.
- 9.3 Subtenas la Internacian Krimo-Kortumon. En militkrimoj, seksa perforto, kia amasa seksperforto, estu konsiderata kiel militkrimo, kaj krimoj kontraŭ la naturmedio dum konfliktaj tempoj estu same konsiderataj.
- 9.4 Klopodas redukti tutmondan potencon de la militarisma-industria-financa komplekso por radikale redukti la armilo-komercon, certigi la travideblan produktadon kaj forpreni kaŝitajn subtenojn favore al la armilo-industrio.
- 9.5 Laboros por reguli kaj redukti, kun la celo finfine abolicii la internacian armilo-komercon (inkluzive la malpermeson de atomnukleaj, biologiaj kaj ĥemiaj armiloj, armiloj kun malriĉigita uranio, kaj kontraŭhomaj minoj) kaj subigi ĝin al la UN.
- 9.6 Helpos fortigi ekzistantajn porpacajn programojn kaj forĝi novajn programojn pri ĉiuj aspektoj kiel konstrui kulturon de paco. La programoj inkludos analizon de la radikoj de perforto, inkluzive interfamilia perforto, kaj la temon de mutuala respekto inter ambaŭ seksoj; kaj subtenos trejnadon en ne-perforta konflikto-solvo sur ĉiuj niveloj.
- 9.7 Serĉos amendi la internaciajn regulojn de militara engaĝiĝo por certigi, ke naturaj resursoj estos taŭge protektataj dum konfliktoj.
- 9.8 Batalos kontraŭ ajna Nacia Kontraŭrakeda Defendo-Projekto, kaj laboros cele al malarmado kaj abolicio de atomnukleaj instalaĵoj en la kosmo.

10. Agante tutmonde

- 10.0 La Tutmondaj Verduloj estas sendependaj organizaĵoj el diversaj kulturoj kaj devenoj, kiuj havas komunan celon kaj agnoskas, ke, por akiri ĝin, ni devas agi tutmonde same kiel surloke.

La Verduloj -

- 10.1 Laboros komune por realigi la Ĉarton de la Tutmondaj Verduloj, agante kune pri temoj de tutmonda konsekvenco kiam ajn necesos.
- 10.2 Subtenos la evoluon de Verdaj Partioj, politikaj movadoj kaj junularaj retoj ĉirkaŭ la mondo.
- 10.3 Asistos, laŭ ilia peto, aliajn Verdajn Partiojn kaj movadojn, provizante balot-observantojn kiuj helpas certigi, ke balotoj okazas libere kaj juste; kaj kuraĝigante voĉdonrajtulojn enlistiĝi kaj baloti por la Verduloj en siaj hejmlandoj.
- 10.4 Adoptos kaj praktikos en niaj propraj organizaĵoj la demokratiajn principojn kiujn ni postulas ĝenerale en la socio.
- 10.5 Agados kiel modelo de partoprenanta demokratio en niaj propraj internaj organizaĵoj sur ĉiuj niveloj.
- 10.6 Kuraĝigos kooperadon inter la tutmondaj Verdaj Partioj por certigi ke membro-partioj estu konsultataj, edukataj kaj havu egalajn kapacitojn por influi tutmondajn poziciojn de la Verduloj.
- 10.7 Kuraĝigos Verdajn Partiojn kaj verdajn politikajn movadojn montri gvidecon, establiĝante politikojn kiuj garantias travideblajn kaj decentralizitajn strukturojn, tiel ke politika forto kaj oportuneco validu por ĉiuj membroj; kaj disvolvante novajn politikajn modelojn kiuj pli bone tauĝas por la defioj de daŭripova disvolvo kaj bazo-komuna demokratio.
- 10.8 Evitos financfontojn, kiuj konflikta kun nia vizio kaj niaj valoroj.
- 10.9 Evitos kooperadon kun diktatoraj reĝimoj, sektoj, aŭ krimaj organizaĵoj kaj iliaj vasaloj; aparte rilate demokratio kaj homaj rajtoj.
- 10.10 Fortigas niajn ligojn kun simile pensantaj bazo-komunaj organizaĵoj kaj tiuj de la civila socio; kune kun ili ni apartenas al la kreskanta konscio ke respekto por la natura medio, por sociaj kaj homaj rajtoj kaj por demokratio validas pli ol la ekonomia organizado de la mondo.
- 10.11 Subtenos unu la alian persone kaj politike per amikeco, optimismo kaj bona humoro kaj ne forgesos amuziĝi dum la agado !

Esperanto-Versio tradukita de la Asocio de Verduloj Esperantistaj (AVE):

AVE, Kandelstr. 62, D-79194 Gundelfingen

ave@verduloj.org, www.verduloj.org

Glosaro - rimarkoj & klarigoj:

(/en: ...) montras la originan anglan esprimon

- aŭtohtonaj homoj : indighenaj homoj, kiuj vivis longtempe en la koncerna regiono
- biliono = 10^{12} (/us-en: trillion)
- bazo-komuna (/en: grassroots)
- baz-komunumoj: kunlaborantaj personoj. (/en: communities)
- bioinvado: organismoj (plantoj, bestoj, ..) el aliaj kontinentoj envojaĝas kaj pro manko da malamikoj k.s. plimultiĝas troe. (/en: bioinvasion)
- daŭripova aŭ daŭrigebla (/en: sustainable)
- disvolvi (transitiva.), evolui (ntr.)
- ĝendra servas nuntempe por la rilato de ambau seksoj en la socio
- ĝendra respekto en la gramatiko de Esperanto postulas la paralelan sufikson kaj masklan kaj femalan: la establiĝantaj formoj estas – in- kaj -iĉ-, do virino kaj viriĉo
- ne-partioj (angle: non-parties), landoj kiuj ne apartenas ekz-e al OEKE
- nul-karbona ekonomio ne altigas la kvoton da karbondioksido en la atmosfero
- okcidentaj landoj havas altevoluitan industrion, kaj konsumas multe da energio
- "ŝanĝo de ŝuldoj favore al la naturo" : interŝanĝo de eksterlandaj ŝuldoj kontraŭ la devigo protekti la enlandan naturon. (/en: 'debt for nature' swaps)

Internaciaj organizaĵoj - mallongigoj kaj klarigoj

Asocio de Verdaj Partioj : por ekologia & sociala & demokratia & pacema politiko (/en: Global Greens)

BNP (Brutta Nacia Produkto), (/en: GDP, Gross Domestic Product): jara sumo de produktitaj varoj kaj pagataj servoj. Pli bone taŭgas por eltrovi la vivkvaliton, bonfarton de iu lando: NBI. Nacia Bonfarto-Indico (/de: NWI, Nationaler Wohlfahrtsindex), www.agenda21-treffpunkt.de/lexikon/NWI.htm

GMO (Genetike Modifitaj Organismoj) : ŝanĝi ecojn de besto aŭ planto per enkonduko de genetika informo el alia speco (ekz-e fragoj kun geno el fiŝo por toleri froston (/en: GMO, Genetically Modified Organisms)

IMF (Internacia Mona Fonduso) (/en: IMF, International Monetary Foundation)

ITKK (Internacia Teamo kontraŭante la Klimatan Katastrofon), (/en: IPCC, International Panel for the Climate Catastrophe)

MOK (Monda Komerca O-o) (/en: WTO, World Trade Organization)

OEKE (O-o por Ekonomia Kooperado kaj Evoluo), organizaĵo de industrio-landoj; ne parto de UN (/en: OECD, Organization for Economic Cooperation and Development)

TMO, Tutmonda Media Oficejo, (/en: GEF, Global Environment Facility)

Unuiĝintaj Nacioj (/en: UN, United Nations)

UNDP (UN Disvolvo-Programo) (/en: UNDP, UN Development Program)

UNMP (UN Medio-Programo) (/en: UNEP, UN Environmental Program, Nairobi)

Asocio de Verduloj Esperantistaj, ave@verduloj.org, www.verduloj.org